

## Agado Per-Esperanto por subteni daŭripovan evoluon 2018-06-07

UN lanĉis la 17 novajn evoluo-celojn. La Esperanto-Movado pretas kunlabori rilate daŭripovon:

- unue informi pri kaj instrui Esperanton;
- due agadi Por-Esperanto en evoluiĝantaj landoj;
- trie agadi Per-Esperanto subteni evoluon ĝenerale.

Necesus organiza subteno flanke de UEA kaj SAT kaj de naciaj Esperanto-organizaĵoj tiel ke la financaj subtenoj povus esti kolektataj pli efike kaj regule, subtenante la agadon de unuopaj grupoj (kiel AVE) aŭ personoj. Subteno temas pri:

1. Formalaj donaco-kvitancoj por la financ-oficejoj de unuopaj ŝtatoj (ekz-e EU-vasta fonduso), tiel ke donacantoj povas redukti sian imposto-pagon, kio aparte gravas se firmaoj aŭ aliaj fondusoj donacas.

2. Inform-kolekto pri kvalito de tiaj projektoj; unue kiel datum-bazo kaj due indus havi konfirmon de neŭtrala persono pri la faritaj projektoj malgraŭ tio ke kompleta garantio ne eblas.

Ekzemple: AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj, kunlaboranta fakasocio de UEA pri Ekologio) kunlaboras kun aliaj grupoj da esperantistoj kaj eĉ ne-esperantistaj grupoj subtenadi projektojn ĉefe en Tanzanio kaj D.R. Kongo.

AVE feliĉe trovis german-lingvan fonduson kun kiu ni bone kunlaboras, sed preferus Esperanto-fonduson.

„**Mazingira**“ (vilaĝaro Ketare/Marambeka en nord-okcidenta Tanzanio proksime de Bunda), surloke organizita de esperantisto Mramba Simba; kunlaboro kun AVE ekde 2006, kaj kun aliaj europaj grupoj:  
- putoj por trinkakvo, kaj kolekti pluvakvon por bestoj kaj akvumi la ĝardenojn

- lernejoj-kostoj por orfoj, por materialo kaj „uniformo“
- Esperanto Secondary School en Marambeka
- agrikulturo, sunflora oleo, kaj rearbarigo
- operacioj de infanoj kriplitaj pro vakcinado kontraŭ malario
- regajneblaj energioj (fotovoltaiko, pli efikaj kuir-fornoj), rearbarigo ankaŭ per frukt-arboj.

**Mazingira-Projekto 2017: internato por lernantinoj** che ESS Marambeka, ĉar kelkaj estis perfortitaj sur la longa vojo (ĝis 10 km) – ni subtenis domon por 24 knabinoj; „Wilde Gans“ alian por 80 !. Ili loĝos tie ĝis la ferioj, ricevos nutraĵon de gepatroj. Ni kolektis 6.200 Euroj, i.a 5.200 de „Cents-for-help“ de Bosch (dank' al organiza subteno de Janek Bender).

**2018** necesas ankoraŭ mebloj kaj manghejo kun salonoj por lerni kaj renkontighi; entute ch. 2000 Euro.

"**Akvo por Kalima**" (80 mil da enloĝantoj, kun Kakutya 130 mil), provinco Maniema, D.R. Kongo:  
- komence ni subtenis la agadon de esperantisto Etienne Katchelewa kiu studis agrikulturon, fondis kooperativon PIEADC, enkadre de chi-tiu: 2013 subtenis por materialo re-aktivigi fiŝ-lagojn; kaj kultivi legomojn. Multaj bildoj pri Kalima sur retejo de Betty:

<http://rosejo.blogspot.dk/>

- 2017 ni financis la 4-an projekton de Etienne "Akvo por Kalima", provizi trinkakvon por ĉ. 9 mil homoj, ĉar nur malmultaj havas aliron al salubra trinkakvo.

- **2018 konstrui akvo-prenejon je Abuki-rivereto** sur monto Abuki. Bezonatas 38.000 Euro: 25 mil de ministerio pri ekonomia kunlaboro, 10 mil de fonduso de iu firmao, **ni petas 3 mil de samideanoj**;

lokanoj aldonas materialon kaj laboron (ch. 3 mil).

Estante la kooperativo povas ĉerpi sufiche da mono el la vendo de akvo, por etendi la provizon al la tuta urbo.

**Uvira**, Suda Kivuo, D.R.Kongo - Martin Fadhili Enzo:

- lernopago por orfoj (momente ni subtenas 2)

- Rearbarigo kaj ĝardeno-projekto:

Ni lernis de Wangari Maathai ke rearbarigo estas la kondiĉo por teni la akvon en la regiono, kaj ricevi pli da pluvo kaj trinkakvo. Martin plendis ke oni forhakis arbarojn dum la militado, krome pro ligno-karbo. Necesus konstrui pli-efikajn kuir-fornojn, au sun-fornojn, kiuj reduktos la bezonon da ligno-karbo. Kune kun lernantoj li kultivis diversajn arbidojn kaj plantas ilin en la montaro proksime de la lago Tanganjika. Krome Martin ankaŭ kultivos legomojn por bona nutraĵo. Li subtenas grupon da lernantoj, kiuj ankaŭ lernas Esperanton. Dum la ferioj (kaj la pluv-sezono) en Aŭgusto ili laboris. La projekto ricevis ch. 1600 Euro, i.i. 400 de „Amikoj de Wangari Maathai“.

Aliaj samideanoj (en Goma, Rumonge, Niĝerlando (Psiko-socia helpo, studentoj, rearbarigo, pli efikaj kuir-fornoj), ...) petas subteni evoluoprojektojn. Mi volonte disdonas la informojn.

### Bonvolu subteni Akvon por Kalima

Vi povas transpigi al nia UEA-konto: avex-z, al UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A Noto: (por avex-z, Kalima, de "via nomo")

**Alternative** : Direkthilfe für Kleinprojekte e.V. Flauserstr.1, 79102 Freiburg, Tel. 0761 25109, rete: [www.direkthilfe-freiburg.de](http://www.direkthilfe-freiburg.de), IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02, BIC: GENODE61FR1 (por gravaj subtenoj indas aldoni vian adreson!)

### Koran Dankon !

**D-ro Manfred Westermayer**  
(Asocio de Verduloj Esperantistaj)

Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, Germanio  
e-mail : [manfred@westermayer.de](mailto:manfred@westermayer.de), [verduloj.org](mailto:verduloj.org)